

La Unuaj Principoj kaj Ordonoj de la Evangelio - Fido, Pento, Bapto, Sankta Spirito

"Kaj Petro diris al ili; Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito." La Agoj 2:38.

Fido al la Sinjoro Jesuo Kristo

"... sen fido neeble estas plaĉi al Li: ĉar necese estas ke tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke li ekzistas, kaj ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas." Hebreoj 11:6.

Pento

"Pentu do, kaj konvertiĝu, por ke viaj pekoj estu forviŝitaj, por ke venu tempoj de refreŝigo de la vizaĝo de la Eternulo." La Agoj 3:19.

Bapto per Subakvigo

"Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito." Mateo 28:19.

La Donaco de la Sankta Spirito

"Tiam ili metis la manojn sur ilin, kaj ili ricevis la Sanktan Spiriton." La Agoj 8:17.

"Ni kredas, de la unuaj principoj kaj ritoj de la Evangelio estas 1. Fido al la Sinjoro Jesuo Kristo. 2. Pento. 3. Bapto per subakvigo por ricevi la pardonon de pekoj. 4. Surmeto de manoj por la donaco de la Sankta Spirito." La Profeto Jozefo Smith.

Vi Devas Persisti Ĝis la Fino

Fido, pento, subakviga bapto por la pardono de pekoj, kaj la surmeto de manoj por la donaco de la Sankta Spirito estas paŝoj, el kiuj konsistas la eniro al la Eklezio kaj al la Regno de Dio. Sed tio estas nur la komenco. Kristo ankaŭ diris, ke kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. Mateo 24:13.

Kristo la Aŭtoro de la Savo

"Tiu, kvankam li estis Filo, tamen lernis obeon per tio, kion li suferis: kaj perfektigite, li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj." Hebreoj 5:8-9.

Jesuo estis Instruisto, Veninta de Dio

"Estis viro...ĉefo inter la Judoj: tiu venis al Jesuo nokte kaj diris al li: Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio: ĉar neniuj povas fari tiujn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li." Johano 3:1-2.

Nur per Kristo Vi Povos Reiri al Dio

Jesuo diris: "...Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniuj venas al la Patro krom per mi." Johano 14:6

"Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo, sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo." Mateo 7:21.

Vivu Honore

Memrespekto, fido, paco kaj kompreno estas la fruktoj de farado kaj sistemo, ne gravas kiel malkuraĝa vi estas hodiaŭ. Granda leciono estas lerni kiel vivi vian vivon kun honoro, kuraĝo kaj fido.

La Bona Vivo estas la Rezulto de Via Obeo

La obeo al la instruoj de Kristo, kiu rezultas en la bona vivo kaj antaŭeniro kaj sekvu la paŝojn al la Regno de Dio.

La aplikado de ĉi tiuj instruoj en la vivoj de unuopuloj faras malbonulojn bonaj kaj bonulojn pli bonaj. La plano de Dio por Sijaj infanoj estas progresema.

Kristo Instruis la Grandan Ordonon

"Majstro, kiu estas la granda ordono en la leĝo? Kaj li diris al li: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono." Mateo 22:36-38.

La Dua Granda Ordonon de Kristo

"Kaj due estas simila al ĝi" Amu vian proksimumon kiel vi mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj." Mateo 22:39-40.

Li Petas Nur Unu Celon de Vi

"Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta." Mateo 5:48.

Vi Rikoltos Kion Vi Semas

Ni evoluas kaj pliboniĝas nur kiam ni uzas tion, kion la Eternulo donas al ni. La leĝo, kiun Dio donis al Adam: "En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon..." ne estis nur por korpa nutraĵo, sed estis ankaŭ leĝo por la savo de la animo. Vi rikoltos nur tion, kion vi semas.

Religio Estas Ĉiutaga Defio

Religio ne estas nur la fojfoja dimanĉlernejo. Religio, por havi signifon, konsistu el pli ol simplaj asertoj pri religiaj aferoj. Ĝi konsistu ankaŭ el nuntempaj kaj ĉiutagaj taskoj en kiuj inda memrespekto, amo por aliaj kaj sindonemo al Dio estas gvidaj principoj. Tiu ĉi estas vojo, kiun vi rajtas sekvi. Tion farante, vi partoprenas la heredaĵon de la gloro de Dio.

Kristo Instruis al Vi Vivi kun Aliaj

"Vi aŭdis, ke estas dirite: Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; sed mi diras al vi; Ne rezistu al malbono, sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian." Mateo 5:38-39.

"Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon." Mateo 5:40.

"Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du." Mateo 5:41.

"Ĉion ajn do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili." Mateo 7:12.

Gepatroj Instruu Infanojn pri la Vero

"Mi ne havas plej grandan ĝojon ol aŭskulti miajn infanojn marŝante en vero" diris la Apostolo Johano. Certe Dio, la Patro de ĉiuj, ne havas plej grandan ĝojon ol vidi diecajn infanojn marŝantaj laŭ la vero. Saĝaj gepatroj ankaŭ estas la plej feliĉaj, kiam ili instruas vere valorajn principojn al siaj infanoj.

Kristo Instruis al Vi Kiel Vivi kun Konflikto

"Vi aŭdis, ke estis dirite; Amu vian proksimulon, kaj malamam vian malamikon. Sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj..." Mateo 5:43-44.

"Tial se vi prezentas vian oferon ĉe la altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon." Mateo 5:23-24.

"Ĉar se vi pardonas al homoj iliajn kulpojn, via Patro ĉiela ankaŭ pardonos al vi." Mateo 6:14.

Vera Religio: Servi Aliajn

Vera religio sin esprimas en servo al aliaj. Servo al aliaj prenas multajn formojn: la ĝusta disciplinado de infano, kuraĝigi tiujn, kiuj estas depremitaj, elmontri bonan ekzemplon, la afabla saluto, krei eblecojn por aliaj. Individuoj, familioj, eĉ nacioj atingas la plej altajn celojn per servo al aliaj.

Religio estas Vero

Responde al la demando "Kio estas vero?" Jozefo Smith diris, "La vero estas kono pri aferoj, kiel ili estas, kiel ili estis kaj kiel ili estos." La akiro de kono kaj la saĝa apliko de ĝi konsistigas grandan parton de la celo de la vivo. Konu la veron kaj la vero liberigos vin.

Kristo Instruis al Vi Doni

"Gardu vin, ke vi ne faru viajn justaĵojn antaŭ homoj, por esti alrigardataj de ili: alie vi ne havas rekompencan ĉe via patro, kiu estas en la ĉielo... Tial, kiam vi donas almozon, ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra." Mateo 6:1-3.

Li Instruis al Vi Preĝi

"Kaj kiam vi preĝas, ne estu kiel la hipokrituloj: ĉar ili amas preĝi starante en la sinagogoj kaj ĉe la anguloj de la stratoj, por montri sin al homoj... Sed vi, kiam vi preĝas, eniru vian ĉambreton, kaj ŝlosinte vian pordon, preĝu al via Patro, kiu estas en sekreto." Mateo 6:5-6.

Kio estas Pura Religio?

Religio pura kaj senmakula antaŭ nia Dio kaj Patro estas jene: "...viziti orfojn kaj vidvinojn en ilia mizero, kaj sin gardi senmakule de la mondo." Jakobo 1:27.

Ĉiuj Mortemuloj Releviĝos

Kiam ni forlasos ĉi tiun morteman vivon, ni troviĝos en la spirita mondo kun nia propra identeco kaj kun pliaj eblecoj progresi. Ĉar Jesuo Kristo releviĝis, ĉiuj estos relevitaj. Tio signifas, ke la korpo kaj la animo reunuiĝos kaj tiam la homoj vivos eterne kaj gajnos sian rekompencan en la "altaj regnoj" laŭmerite en la programo de Dio por antaŭeniĝo de liaj infanoj.

Vi Respondekas al Dio

Ekzistas senmorteco, ekzistas respondeco, ekzistas ĉielo kaj estonteco. Ekzistas absoluta kaj eterna Patro, kiu sendis vin ĉi tien kaj atendas, ke vi reiru kaj respondu pri tio, kion vi faras laŭ viaj eblecoj. Ĉi tiu vivo estas la tempo por la homoj sinpretiĝi por renkonti Dion. Vi

progresos al persona ĉiama vivo kaj ricevos la respondojn kaj pacon promesitajn de Li, kiu diris: "Ĉi tio estas eterna vivo, koni vin, la sola vera Dio, kaj Jesuon Kriston, kiun Vi sendis."

Vi Ricevos Rekompencon pro Via Obeo al la Ordonoj de Dio

Ĉe la domo de mia Patro estas multe da domegoj: se ne tiel estus, mi dirus al vi: mi iras por pretigi por vi lokon...por ke vi ankaŭ estu tie, kie mi estas." Johano 14:2-3.

"Sed kiel estas skribite, Tion, kion okulo ne vidas kaj orelo ne aŭdis kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas." I Korintanoj 2:9.

"Jesuo diris al ŝi: Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos." Johano 11:25.

Antaŭtera Vivo

Ijob deklaris: "Sed la spirito en la homoj kaj la spiro de la Plejpotenculo donas al ili prudenton." Tiuj ĉi spiritoj vivis en la ĉeesto de la Patro de Spiritoj antaŭ ol ni naskiĝis. Tio, kion ni faris tie, influis niajn vivojn tie ĉi, same kiel kion ni faras tie ĉi, rekompencos aŭ malhelpos nin en la estonta vivo. Tiu ĉi alta vero donas celon al la morteme vivo. Ijob 32:8.

Naskiĝo

La miraklo de naskiĝo estas grava paŝo en majstra plano, kiu malfermas la eblecojn al ĉiu spiritido de Dio ricevi terajn instruojn, per kiuj kontentiga feliĉo kaj progreso atingeblas.

Fido

La unua respondeco de gepatroj estas instrui al iliaj infanoj fidon kaj honestan agadon antaŭ la Sinjoro. Ĉi tiu instruado komencu sur la genuoj de la patrino. Ĝi finos nur kiam la gepatroj vidas, ke siaj infanoj sekvas la vojon al sukceso kaj eterna feliĉo.

Edukado

La Gloro de Dio estas inteligenteco. Kian ajn nivelon de inteligenteco, kiun ni atingos en ĉi tiu vivo, releviĝos kun ni en la releviĝo. Ci tiuj altaj principoj de edukado devas inspiri ĉiujn pliboniĝi dum nia tuta tera vivo. Neeblas, ke homo estos savita en nescio.

Eterna Geedzeco

Kiel la spirito kaj la korpo de homo estas eternaj, ankaŭ eblas, ke la familia rondo estos eterna per obeado al la leĝoj kaj principoj de la evangelio. Unu el la plej belaj el ĉi tiuj principoj estas la geedzeco por "tempo kaj eterneco". Per ĉi tiuj sanktaj ceremonio kaj

principo, indaj paroj rajtas resti unuigitaj ne nur ĝis la morto, se por ĉiam.

Laboro kaj Servo

"Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi." Genezo 1:28. Ĉi tiu estas la unua ordono de Dio donita al Liaj teraj infanoj. Kaj ĉi tiu konsilo valoras por ĉiuj: ke diligenta laboro estas honorinda kaj bona por la homaro.

Familia Unueco

Kun la alveno de infanoj al la geedza paro, familiaj grupoj, per virta, honesta vivo kaj oboe al la diaj leĝoj, povas ĝui la altan staton de feliĉo, kiu rezultas el la sankta certeco, ke familia unueco povos daŭri post la tombo.

Kontraŭeco

La signifo de la vivo ne estas seninterrompa serio de benoj. Homoj plifortikiĝas, kiam ili venkas obstaklojn kaj per la rezisto al malbono. Ŝakspiro diris "Dolĉaj estas la uzoj de kontraŭeco", kaj Paŭlo plejbone diris, "La Sinjoro punas tiujn, kiujn li amas."

Plenumo

Kio alportas al ni pli da feliĉo al kiam ni vidas la kreskon de niaj infanoj kaj nepoj cele al saĝeco kaj pliboniĝo? Ĉie ni vidas la defion postlasi pli bonan kaj pli saĝan mondon por sekvontaj generacioj.

Morto

La morto, kiel la naskiĝo, estas parto de la eterna vivo. Plimalpli baldaŭ, ni devos alfronti ĝin. Kiam la morto venas al tiuj, kiuj havas fidon, ke ili ankoraŭ vivos kun geamikoj kaj familianoj, estas pli da kontenteco ol malĝojo en la neevitebla evento.

Postmorta Vivo

La vivo estas eterna. La spirito de homo neniam mortos kaj la universala reunuiĝo de la spirito kaj la korpo estas promesita al ĉiuj. "Ĉar kiel Adam, ĉiuj mortas, tiel same ankaŭ en Kristo ĉiuj estos vivigitaj." I Korintanoj 15:22

Post tio, al ĉiuj ni, venos la rekompenco kaj punoj gajnitaj sur la tero. Eternaj progreso kaj feliĉo estas la fina espero de ĉiuj.

Venu sekvi min... Mi estas la vojo, la vero kaj la vivo.

(Tradukis Wayne Illes)